RUĜAJ LINIOJ EN TURKIO.

Ĝis kiam pretas atendi Eŭropa Unio por sincere postuli klarigojn al Turkio? Ne perturbas, ŝajne, la persekutoj kaj murdoj kontraŭ la kurdoj, la silentigado de la kritikaj voĉoj, la purigado farita en la Administrado... Du respondeculojn kaj naŭ deputitojn de la PDP(1) oni enkarcerigis hieraŭ (*). Recep Tayyip Erdogan, la prezidento de Turkio, faras kion li volas. Kion li volas kaj kiel li volas. Senpuneco tuj apud la Eŭropa Unio. Nun li estas najbaro de la Eŭropa Unio, sed membro volas esti. Antaŭlonge oni komencis la negocadojn por ke ĝi iam povu esti.

"Ni esperas, ke Turkio respektos sian parlamentan demokration, inkludante la homrajtojn kaj leĝojn", laŭ la diro de Federica Mogherini, ĉefo de la ekstera politiko de la Eŭropa Unio. Pasintan mardon Martin Schulz, la prezidento de la Eŭropa Parlamento, atribuis al Turkio esti transpasinta la ruĝajn liniojn de la esprimlibereco pro la operaco kontraŭ la ĵurnalo Cumhuriyet. "Mi fajfas pri viaj ruĝaj linioj", orgojle respondis Binali Yildirim, la unua ministro.

Turkio minacis Eŭropan Union: paŝojn ĝi volas, por ke la turkoj povu senvize eniri Eŭropon; se ne, ĝi forlasos la traktaton pri migrado – akordo, per kiu Turkio retenas kaj forsendas rifuĝintojn. Se estos tiel, ruĝa linio estos ne por Turkio, sed por Eŭropa Unio, kaj ĝi daŭre englutos ĉion, kion faros Erdogan.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):
(1) Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.

KLARIGOJ:
Aŭtoro: Jakes Goikoetxea.
(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 5-an de Novembro 2016-a.
Tradukis: NXC. Decembro 2016-a.
Provlegis: Aitor Arana kaj Dominik Schram.